BARCELONA ESPERANTO - CENTRO

C/CARRERAS I CANDI 34
TELEFON:2.40.26.62.
08028-Barcelona
Katalunio,Hispanujo

JUNULARA SEKCIO BE-C

# -ĜENERALA-INFORMILO-

N-ro 60 JUNIO 1988

## INTERNACIA FESTO

La tagon 4an de julio (Lundo),vizitos nian centron grupo da samideanoj el Pollando;ili restos en nia urbo la tutam tagon kaj deziras renkontiĝi kun barcelonaj esperantistoj,viziti la urbon kaj organizi kulturan kunvenon. Kiu estas interesata kunlabori en la akcepto, akompani ilin, aŭ gastigi iun ajn en sia hejmo,bonvolu informi nin pri siaj deziroj kaj eblecoj. Ĉar la vizitontoj estos proksimume 50 gesamideanoj,pli malpli,ni devus plani diversajn eblecojn.
Samideano profitu de tiu ebleco por uzi Esperanton Internacie !!

---

## ESPERANTO - EKZAMENOJ

En la lasta semajno de junio,disvolviĝos Esperanto-Ekzamenoj en du niveloj: KAPABLA ESPERANTISTO kaj ESPERANTISTA INSTRUISTO,laŭ la planoj de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj Hispana Esperanto-Federacio.
Interesatoj,scios pliajn informojn en nia sekretariejo.

---

## SOMERA ESPERANTO-KURSO

Kiel ĉiujare,en la monatoj AŬGUSTO kaj SEPTEMBRO,nia centro organizos intensan Esperanto-Kurson por neesperantistoj,t.t. nur por komencantoj.Datoj: de la 1a de aŭgusto ĝis la 28a de septembro .

---

## ATOMO INFORMAS

DIVERSFOJE APERIS EN LA ESPERANTO-GAZETARO KONFUZAJ INFORMOJ PRI LA STRUKTURO DE LA ESPERANTO--ORGANIZOJ

El la JAR-RAPORTO DE HEJS Printempo-87....Printempo-88,ni publikigas tiun parton,kiu certe lumigos la dubojn de kelkaj samideanoj.

HEJS estas la junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj landa sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).

Federaciiĝintaj asocioj:

Por Andaluzio. Andaluzia Esperanto-Junularo (AEJ).
Por Aragono.JUNULARA ESPERANTISTA SOCIETO ARAGONA (JESA).
Por Baskio. ALAVA ESPERANTO-ASOCIO (AEA).
Por Katalunio.JUNULARA ESPERANTISTA KATALUNA ASOCIO (JEKA).
Por Madrido. MADRIDA ESPERANTO-JUNULARO (MEJ).
Por Valencio-Murcio.Mediterranea Grupo "JUNA SUDO" (JS).
Delegito en ne federaciiĝinta zono:Jesús Bermúdez (Galegio)

---